# *Kubo atingis indikilon de infanmorteco je 4,3 por ?iu mil vivnaskito.*



Por la 8-a fojo sinsekve la indikilo de infanmorteco por ?iu mil vivnaskito ratifas Kubon inter la unuaj 20 landoj tutmonde kaj kape de la amerika regiono.

La? la unuaj raportoj de la direkcio pri medicinaj registroj kaj sanstatistiko, en la ?us fini?inta jaro, sciigis ke naski?is 125 964 infanoj, 2 421 pliaj ol en 2014, kaj forpasis 535 infanoj malpli ol unujaraj, kio indikas infanmortecon je 4,3 por ?iu mil vivnaskito, publikigis la gazeto Granma.

Aliaj gravaj indikiloj montras ke la sanstato de la infanaro solidi?as. La? la doktoro Roberto Álvarez Fumero, estro de la departemento por infanoj de la ministerio pri publika sano, la indikilo de infanmorteco de infanoj ?is kvin jaroj, kiu indikas progreson de bonfarto infana, atingis la ciferon je 5,7 por ?iu mil vivnaskito, tio estas jam dum kvar jaroj sinsekve ?i kondutis sub la nivelo je 6 forpasoj en unu jaro.

La fakulo esprimis ke tiuj rezultoj devenas el la universala aliro al sanservoj kaj socia evoluo inkluda kaj homa, atingita de Kubo, kiel prioritata fakto donata de la ?tato al la publika sano kaj anka? evidentigas garantio de seksaj kaj reproduktaj rajtoj, samkiel la garantio al la rajto de infanoj kaj infaninoj tra la tuta lando.

Tiamaniere eblas konstati kiel Kubo plenumas la strategion kaj agadplanon regionan pri sano de la ?usnaskito, anka? la celon redukti la mortecon de infanoj malpli ol kvin jaraj por atingi la Celojn de la Jarmilo kaj avanci en la rekomendoj de la agendo por evoluo depost 2015.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/80363-kubo-atingis-indikilon-de-infanmorteco-je-43-por-ciu-mil-vivnaskito

**Radio Habana Cuba**